# EKO 2013

Rekreita arĥivo de la ok postkongresaj komunikoj de la jaro, lanĉita sub la nomo 'Estraraj Komunikoj' kun la celoj subteni la landan agadon kaj la novan AMO-programon.

Sendita el Budapeŝto, la 12an de aŭgusto, al pli vasta ricevantaro ol por la unua komuniko. Vortoj: 445

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Poste al: Landaj Sekcioj de ILEI, Fakaj Asocioj de UEA Regionaj komisionoj de UEA.

**Nacilingvaj flugfolioj**
Ni petas vin sendi al la Centra Oficejo etajn stokojn de la varbiloj, kiujn vi uzas por diskonigi Esperanton. La CO foje ricevas petojn por nacilingvaj materialoj, ekzemple por disdoni en budo kun internacia partoprenantaro. Pli efike estas, se la CO povos tuje liveri tion. Mi volonte ricevos same tiujn (ĉu fizike, ĉu elektronike) por ekhavi pli bonan superrigardon pri la jam disponebla materialo.

**Anoncu viajn aranĝojn!**
Pretigante kongreson aŭ seminarion, kie vi volonte akceptos internacian publikon – por buntigi la etoson, malkreskigi krokodiladon, fortigi transliman kunlaboradon - memoru la gravecon frue anonci viajn aranĝojn en la konataj kalendaroj kaj specife dissendi invitojn al la Landaj Asocioj de UEA en najbaraj aŭ apudaj landoj, ankaŭ al Landaj Sekcioj de ILEI kaj de TEJO, al Fakaj Asocioj aktivaj en najbaraj landoj kaj al la koncerna Regiona Komisiono de UEA.

**Monda Tago de Instruistoj**
Tio estas proklamita de Unesko kaj ekzistas jam dudekon da jaroj; ni en ILEI ja malkovris kaj eluzis ĝin nur pasintjare. La tago okazas en la 5a de oktobro ĉiujare. Ĉi-jare temas pri sabato. Bonvolu vidi detalojn (ŝanĝante la lingvon laŭbezone) ĉe:
http://www.unesco.org/new/en/unesco/events/prizes-and-celebrations/celebrations/international-days/world-teachersday/

Jen vortoj senditaj de Renato Corsetti al ILEI:

> "Pri ĉi tiu Monda Tago de Instruistoj mi pensas ke ILEI pretigu alvoketon (ne pli ol 20 linioj - homoj ne plu legas longajn tekstojn) en kiu oni klarigas pri kio temas kaj petas ke la landaj sekcioj de ILEI:
>
> - sendu almenaŭ salutmesaĝon al la asocioj de lingvo-instruistoj en la lando
> - kaj krome gazetaran komunikon al la gazetoj (laŭ teksto pretigita de ILEI kaj tradukota de la landaj sekcioj)
> - kaj krome aranĝu kunvenon de Esperanto-instruistoj.
>
> La tri aferoj estas en ordo de malfacilaĵo. Oni povas limiĝi je la unua, aŭ je la unua kaj dua, ktp."

La ideoj validas ankaŭ por LA de UEA; jen perfekta momento por kunlaboro inter LA de UEA kaj LS de ILEI en landoj, kie tio praktike povas glate okazi. Ni nun arigas kelkajn E-aranĝojn, kie oni povos en iu kunveno marki la tagon, tiel ke ni raportu ilin en la interaktiva mapo de la retejo de Unesko, kiel kunfestantoj. Tiuj aranĝoj ne devas nepre okazi en la 5a de oktobro.

Ni survojas fari tion en la 100a Japana Kongreso poste en oktobro, en rumana renkontiĝo fine de aŭgusto, en Pedagogia Tago en Hungario (se aranĝebla). Ni rimarkas aranĝon en Portugalio, ĝuste en la koncerna semajnfino. Bonvolu kontakti min, se en via lando okazos aranĝo, kie eblos prinoti la Tagon. Antaŭdankon!

Nova servo de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, lanĉita en julio 2013, kaj seninterrompe liverita depost tiam, per 264 komunikoj.